Johann Wolfgang von Goethe,

## Roz’ sur erikejo

*tradukita de Konrad Matheus*

Vidiĝis eta ruĝa roz’
de knab‘, sur erikejo.
Ĝi belis en matena ros’.
Hastis li al juna ŝos’
admiri ĝin kun ĝojego.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz’,
roz’ sur erikejo.

Diris knab’: “Mi rompos vin,
rozo sur erikejo.”
Diris roz’: “Dorn’ pikos vin,
por ke vi ne forgesu min.
Al mi ne estu sufero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz’,
roz’ sur erikejo.

Kaj knab’ sovaĝa rompis ĝin,
rozon sur erikejo.
En defend’ roz’ pikis lin.
Sed ve’ kaj aĥ’ ne helpis ĝin.
Venis sort’ sen tolero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz’,
roz’ sur erikejo.

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

## Knab’ rozeton vidis li

*tradukita de Joachim Gießner*

Knab’ rozeton vidis li;
erikeja floro.
Juna, bela estis ĝi.
Por admiri kuris li
ĝoje kun adoro.
Rozo, rozo, ruĝa roz’,
erikeja floro.

Diris knab’: „Mi rompos vin,
vi rozeta floro“.
Diris roz’: „Mi pikos vin,
ke vi ne forgesos min,
premas min doloro.“.
Rozo, rozo, ruĝa roz’,
erikeja floro.

Knab’ sovaĝa rompis ĝin;
erikeja floro.
Rozo ja defendis sin
kaj sufere pikis lin,
ne utilis ploro.
Rozo, rozo, ruĝa roz’,
erikeja floro.

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

## Dornrozeto

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Vidis knab’: Jen, juna flor’!
Rozujet’ kampara!
Bela, kiel la aŭror’!
Li alkuris ĝoje por
Vidi, kiel kara!
Rozo, rozo, ruĝa roz’,
Rozujet’ kampara.

Diris knab’: Mi volas vin,
Rozujet’ kampara.
Diris roz’: Mi boras vin,
Ĉiam vi memoras min,
Pro l’ dolor’ amara.
Rozo, rozo, ruĝa roz’,
Rozujet’ kampara.

Knabo rozon ŝiris do
De l’ rozuj’ kampara,
Ĝi, defende, pikis tro!
Sed ne helpis ve kaj ho
Kontraŭ vol’ barbara.
Rozo, rozo, ruĝa roz’,
Rozujet’ kampara.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.*

*Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)*

*S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)*

*Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en* **http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf**.

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Kálmán Kalocsay *(Kalmano Kaloĉajo, ∗1911 – †1976).*

*Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en* **http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm**.